

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 6. — JUNIO 1928



Katedralo: Pordo de la Pardonado, SEVILLA. — Ĝi apartenas al la
araba arkitekturo kaj staras en la parto de la antikva moskeo.

PRI LA VII^a HISPANA ESPER-KONGRESO

Sub prezido de D-ro Cortezo (jen kiel oni daŭrigas konsiderante lin kvazaŭ efektivan Prezidanton), la 27.^{an} de Majo, kun ĉeesto de S-ro Carlos Martínez, Sekretario-Kasisto de la Loka Komitato por la VII.^a Kongreso en Sevilla, kunvenis la Centra Komitato por la Kongreso pritraktante aferojn prezentitajn de S-ro Martínez kaj aliajn, voĉdonante unuanime.

I. Proponi la Honoran Prezidantecon al nia Reĝa Moŝto;

II. Doni la Honorajn Prezidantecon al Reĝida Moŝto kaj ĝeneralestro de Andaluzio, Don Carlos de Borbon, al Kardinalo de Sevilla, al Provincestro kaj Reĝa Komisararo de la Hispan-amerika Ekspozicio, al la Prezidanto de la Provinca Deputataro kaj Urbestro de Sevilla;

III. Honoran Membrecon por D-ro Carlos María Cortezo, kaj por la Prezidantoj de la Societo Amikoj de la Lando kaj de la Ateneo, de Sevilla, kaj por S-ro. Alfonso Trias, Urbokonsilanto de Sevilla.

IV. Okazigi la disdonadon de premioj kaj feston de la flagoj samtempe;

V. Okazigi, dum la tagoj de la Kongreso, la du ekskursojn al romanaj ruinoj de Italiko kaj Groto de la Mirindaĵoj de Aracena (23 pesetojn, ĉio enkalkulita), kaj al Carmona (12 pesetojn);

VI. Proponi Honorantan Feston al nia glora mortinto S-ro Ricardo Codorniu, surmetante bronzan kronon de la Hispana Esperanto-Asocio sur la piedestalo de lia busto ĉe la Parko de Madrido;

VII. Proponi al la Kongreso fondi la Ordenon de la Honora Verda Stelo por la hispanaj pioniroj, kiujn konsideros indaj je ĝi la Kongresanaro, pro ilia esperanta laboro koncernanta organizadon, propagandan laboron, klarigadon de kursoj kaj efikan aplikadon de Esperanto al interhoma helpo, ne atentante meritojn pro literatura laboro aŭ verkadlaboro. Proponi nur *unu solan pioniron* po ĉiu Kongreso, kaj ke la unua kavaliro de la Ordeno estu nia meritplena samideano de Ĉeste, S-ro Francisco Mániz;

VIII. Peti al Fervojoj Kompanioj rabaton por la Kongresanoj.

La Ĝeneralestro de Andaluzio, Moŝta Reĝido Don Carlos de Borbón kaj la Urbestro de Sevilla jam akceptis la Honorajn Vicprezidante-

cojn aluditajn. La Urbeŝtaro de Sevilla monhelpas la Kongreson per 1.000 pesetoj, donos 250 pesetojn kiel premion por la Temo «Kanto al Sevilla», disponas la urban muzikistaron por la Kongreso, la ĉefan salonon de la artega Urbodomo por la malferma kunveno, kaj promesis aranĝi feston je la honoro de la Kongresanoj.

Ne prokrastu aliĝi al la Kongreso, kiu tute certe estos eksterordinare rimarkinda!

VII^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Sevilla de la 5.^a ĝis la 9.^a de Novembro 1928.)

Ni lasas por alia numero informojn pri fervojoj, hoteloj, gastejoj k. c., kaj jen io agrabla certe por la Kongresanoj:

Ekskurso al Carmona: (35 kilometrojn) Vizito al rimarkindaj monumentoj historiaj, al fama romana nekropolo. Halto dum la iro ĉe Alcalá de Guadaira por admiri la famegan kastelon kaj belajn pejzaĝojn. Oni vojaĝos per aŭtobusoj tre oportunaj. Kosto, ĉio enkalkulita, eĉ tagmango en Carmona, 12 pesetojn.

Ekskurso al Aracena: (90 kilometrojn). Sur la vojo oni vizitos la Monaĥejon de Sankta Isidoro de l'Kampo, kiun fondis *Guzmán el Bueno* (*Guzmán'la Bona*); la tutmondfamajn romanajn ruinojn de la romana amfiteatro de *Italica*, kaj fine ĉe Aracena la nekompareblan mirigantan Groton de la Mirindaĵoj. Oni vojaĝos same, kaj la prezo, ĉio enkalkulita eĉ tagmango en Aracena, 23 ptojn. Atentu bone la koston de ambaŭ ekskursoj: 35 pesetojn. Profitu la okazon aliĝante al la Kongreso.

Novaj aliĝoj: 151 Provinca Deputataro de Oviedo; 152-S-ro. Román Ayza, Barono de Tormoye, Madrid; 153-S-ro. Felipe Vilar Torrens, Barcelona; 154-S-ro. Carlos Bosch, Santander; 155-S-ro. Miguel Moreno Castillo, Sevilla; 156-Ateneo Popular de Santander; 157-S-ro. Carlos José Tiard, Paris; 158-S-ro. Eduardo Moreno Caballero, Sevilla; 159-S-ro. José Núñez Rey. Alicante; 160-S-ro. José Santiago, Játiva (Valencia); 161-S-ro. Antonio González Gutiérrez, Cañete de las Torres (Córdoba); 162-S-ro. Juan Gutiérrez Peris, Córdoba; 163-S-ro. Rogelio Luque, Córdoba.

Hispanaj Esperantistoj aliĝu tuj! Fremdaj samideanoj venu al Sevilla por ĝui rimarkindajn tagojn de ĉiuj vidpunktoj! Propagandu la Kon-

greson senĉese kaj ĉie! Ŝparu por partopreni la Kongreson, ĉar certe vi konservos bonegan rememoron dum via tuta vivo!

Sevilla 1.^{an} de Junio de 1928. Je la nomo de L. O. K. la

Sekretario Kasisto

Carlos Martínez Fernández

Rimarko: Leterojn, kotizonjn, mondonacoj, k. t. p., al la Sekretario-Kasisto, strato Rioja, 25-Sevilla.


AL LA HISPANAJ GEINSTRUISTOJ

Utiligante la paĝojn de «El Magisterio Español», ĉi tiun gravan profesion gazeton, kaj komplezante dezirojn de mia amiko kaj samideano, S-ro Sidonio Pintado, mi havas grandan plezuron per ĉi tiu okazo vekti la atenton de la hispanaj geinstruistoj al la granda kaj rimarkinda intereso, al la grandaj utiloj kaj efiko, kiujn liveras la internacia helpa lingvo Esperanto por la edukistoj, kiel elpruvis S-ro Julio Mangada dum la plensimpatia esperantista festo okazigita de la Hispana Esperanto Asocio en la Ateneo de Madrid kaj je mia honoro.

De la vidpunkto de la instruado, liveras Esperanto (jam oni faris en diversaj nacioj konkludentajn kaj plensukcesajn eksperimentojn) rimedon ekstreme precizan por enkonduki la infanon en la gramatikan sistemon de kiu ajn fremda lingvo sen la komplikaĵaro devenanta de la multoblaj reguloj kaj esceptoj, ĉar la tekniko de Esperanto estas tre facila, tre simpla, tre logika. Esperanto, do, estas tiel potenca stimulo por iniciati la infanojn pri la studado de fremdaj lingvoj: La infanoj, per si mem, akiras per Esperanto por sia gepatra lingvo pli grandan intereson, ol ili havis antaŭe. La helpa lingvo Esperanto tre bone taŭgas kiel utiliga preparado aŭ enkonduko al studado de lingvoj eksterordinare analizaj, kiel la germana; eĉ de aliaj grupoj kiel latina aŭ greka lingvoj.

De la vidpunkto de la edukado, ankaŭ Esperanto posedas grandan valoron. Post malmultaj monatoj por studado de la lingvo, la infano povas interrilatiĝadi kun kamaradetoj de aliaj nacioj per aktiva interkorespondado; kaj tial, oni povas konkludi la sekvojn, kiujn ĉi tio havigos al ni por la studo pri Geografio, Historio. Literaturo, kutimoj, k. c.

Tute same, Esperanto estas la plej bona helpilo al la sopirata alprok-



Domo de Pilatos: SEVILLA. — Tiu konstruaĵo estas tre interesa ĉar ĝi enhavas belajn galeriojn ornamitaj de diverskon loraj briketoj kaj mozaikoj, grandaj kortoj kun statuoj, fontanoj, ĝardenoj. En tiu domo estas artriĉa kapelo.

simiĝo de la popoloj, per la intimaj internaciaj interrilatoj; ĝi estas firma kaj efikega vojo al la paco kaj al la firmiĝo de la paco.

Estus por mi plej granda kontento se la hispanaj ĝeinstruistoj enkondukus Esperanton en siajn lernejojn, sin sumante al la ĝeinstruistoj de aliaj nacioj; sed ankoraŭ mia kontento estus des pli granda, se la kleraj kaj spertaj hispanaj ĝeinstruistoj aliĝus ankaŭ tuj al la internaciaj ligoj, por kunvivadi kun la kamaradoj de aliaj popoloj kaj kunlaboradi ĉe la idealoj de tutmondaĵ frateco kaj paco.

Petro Bovet

PRI LA OFICIALA GVIDADO DE L'UNIVERSALA ESPERANTO-MOVADO

Mi opiniis kaj opinias ke la kontrakto de Helsinki estis kvazaŭ reto en kiun falis la esperantistoj; de tiam la Esperanto-Kongresoj ne disvolviĝadas same kiel antaŭe, laŭ plena demokratio kaj rondo familia, sed kiel pilgrimadoj por diigi iujn, kiuj fine konsideras sin, spite de siaj demokratiaj ideoj, plenpovaj, Diktatoroj. En Hispanujo, la plimulto el la Delegitoj de U. E. A., kaj mi dum Kongresoj petis kaj repetis starigi tutlandan teritorion de U. E. A.; sed spite de nia rajto, opinianta ne estas en iu hispana loko persono kapabla preni sur sin la postemon de Ĉefdelegito (ĉi tio ne estas vera), senkulpigante sin, U. E. A. ne konsentis, ĉar ne konsento estas sistema baro.

Nepre necese estas ke la Antverpena Kongreso rehavigu al tutmonda Esperanto-Movado ĝian veran signifon laŭ la doktrino de la Majo tro; pro tio mi subskribas ankaŭ la jenan decidon:

«Ni, membroj de U. E. A., kunvenintaj la 28.^{an} de Aprilo 1928, post legado kaj pridiskutado, aprobas la duan flugfolion «Al la Esperantistaro» de S-ro. Delanoue, Ĉefdelegito de U. E. A. por Francujo:

I.^e Rekomendas, ke la Membroj de U. E. A. elektu specialan Komisionon por esplori kaj kontroli la ĝisnunajn administrajn kaj financajn aferojn de U. E. A.;

II.^e Rekomendas al la Naciaj Societoj kaj al la Antverpena Kongreso serioze:

a) Esplori la ĝisnunan administradon kaj financajn aferojn de I. C. K. kaj L. K. K.-oj;

b) Nuligi la Kontrakton de Helsinki kaj ke ili serioze kaj efike okupiĝu pri la demokrata reorganizo de la Esperanto-Movado.

Agourtine, Chillard, Couteaux, Delanoue, Esselin, Favrel, Flageul, Grisel, Grosjean-Maupin, Hamant, Lauret, Llech René, Méras, Mesny, Pécheux, Rousseau, S-ino Tiard. Arnould (rumano), Grenkamp (polo), Kempeneers (belgo), Linder (germano), Solsona (hispano).

Jam la pasintan jaron, en Dantzig, ni devis pritrakti ĉi tiun aferon kaj labori al solvo; sed neniam estas malfrue, kaj mi rekomendas tute serioze al la hispanaj Delegitoj kaj Membroj de U. E. A. peti la gravegajn cirkulerojn al Sro. Delanone (4, rue Charles-Divry, PARIS XIV.-Compte Postal: Paris 405-44), por koni perfekte la aferon kaj formi klaran opinion, decidi kaj aprobi aŭ ne la antaŭajn punktojn, kaj komuniki al tiu S-ro la decidon. La afero celas ne mortigi U. E. A. n, sed tute male, plifortigi ĝin, ĉar per la kondamnitaj sistemo kaj procedo venos la morto, kaj vi jam bone scias la konstantan deficiton de nia Asocio. Petu la cirkuleron tuj, kaj vi konscios esti nepre necese kaj neprokrasteble aranĝi definitive nian aferon. Certe sendante realan poŝtmarkon al S-ro. Delanoue vi havigos al vi la cirkulerojn, almenaŭ la aluditan.

Julio Mangada Rosenörn

LA HUNDO DE LA FRUKTOĜARDENISTO

Parolante ĝenerale, en ĉiu Asocio estas iu eble entuziasma eĉ kapabla pri la celo ĝia, sed posedanta specialajn kondiĉojn kiuj nuligas lian entuziasmon kaj kapablecon, kaj tial la frukton al la celo, ekzemple: ni havis entuziasman kaj kapablan samideanon, kiu penadis kaj sukcesis, kontraŭ la opinioj de la plimulto, por esti profesoro de esperanto en tre grava Instituto, en kiu Ministro konsentis eksperimentan kurson, ĉar la kapabligho celis la ĉiunomonatan pagon al la posteno, kaj li havis grandan emon al la mono, tiamaniere, ke preskaŭ neniam li pagis kotizojn al grupo, k. t. p. Li komencis tre sukcese la kurso, ĉar la plimulto el la lernantoj (maturaĝuloj) aliĝis al la memvola kurso; sed, post malmultaj tagoj, ĉiuj forlasis la lernadon pro la specialaj kondiĉoj de la klariganto, kaj la Direktoro de la Instituto, kiu sisteme estis malamiko de Esperanto, informis tre malbone pri la lingvo. Se estus irinta klarigi la kurson tiu, kiu min esperantigis, de antaŭ multaj jaroj

Esperanto estus enradikiĝinta en tiu Instituto, kaj estus doninta gravajn sekvojn por la progreso de Esperanto en Hispanujo.

Estas ankaŭ iu, kiu havas grandan entuziasmon kaj kvazaŭ agadfebron, sed ne kapabla esperantisto de la lingva vidpunkto, tamen profesorema, instruantema, kaj samtempe fierema, planema, kvankam ne tute kapekvilibre; kaj ĉi tiu esperantospecimeno estas tiel danĝera, kiel la antaŭa. Kaj se oni celas eviti la danĝeron, kiun li devenigas, li sin montras persekutata, malhelpata, malestimata, oferata, car li maniĝas.

Estas iu, kiu sin opinias altranga, meritanta ĉion..., ĉar li havas grandajn kapablojn, sed li ne laboras, li volas profiti la laboron de l'ceteraj por stari supren, kaj tial ke li staras ĉe OLIMPO, li ne atentis pri bagatelajoj, pri la formika laboro nur propra de malsupera klaso; por li nur honoroj...

Estas iu, kiu posedas grandan fantazon, kiu, sidante apud marmora tablo de kafejo, planas, planadas, kaj per siaj planoj li triumfigos Esperanto; tamen, li apenaŭ varbis membron al Asocio, malfacile pagas sian kotizon al ĝi kaj faris nenion praktikan, sed li laŭte diras fojojn: «oni ne permesas al mi lalabori; oni ne atentis min; ili (koncernante tiujn, kiuj praktike agadas) volas esti solaj», kaj paroladas kritikante agadon de la agemuloj, ne rimarkante, ke faktoj atingitaj estas la plej bonaj pruviloj.

Jen tipoj, kiuj konsciaj esperantistoj devas atenti multe. Esperantistoj neniam devas forgesi, ke ankoraŭ ni vivadas tempon de apostoleco de peniga laboremo kaj memoferejo; ke al niaj Asocioj ne konvenas idoloj, fanfaronuloj, ambiciemuloj... «VIDI POR KREDI», tial la samideanoj facile konstatos ĉiam efikan laboron, ĉar rezultatoj konvinkas ĉu favore ĉu malfavore pri agado ĉies.

Oni povas apliki al ĉi tiuj tipoj la dirojn pri la hundo de la fruktoĝardenisto; «la hundo de la fruktoĝardenisto ne manĝas la manĝotaĵon, sed ĝi ankaŭ ne permesas ĝin manĝi».

J. M. R.


PRO MALJUSTAJ KRITIKOJ

Kiam mi anoncis eldoni ĉi tiun gazeton, kaj per ĝi poste, mi sciigis, ke ĝi estas dekspaga tute en Esperanto, sed ankaŭ mi estas promesinta tekston en hispana kaj esperanta lingvoj. Ĉi tiu promeso firme

staras, sed ne dum la gazeto estu deksespaĝa, jes kiam mi havu la eblecon plinombrigi la paĝojn (ok pliajn paĝojn), ĉar tekston en du lingvoj por 16 paĝoj neniam mi promesis. Mi ĝis hodiaŭ plenumis tiamaniere mian kompromison, ke mi deonas la tutan eldonon je la dispoŝno de H. E. A., kaj publikigis ĉion, kion oni donis al mi koncerne nian Asocion, Instituton kaj Kongreson. Vi, kritikantoj, al kiuj oni povus ankaŭ aljuĝi tion pri la hundo de la fruktoĝardenisto, estu pli konsciaj por kritiki, kaj sciu bone por prave tion fari; ĉar mi scias tute bone tion, kion mi promesis, kaj mi plenumis tute fidele mian kompromison, kiun mi planis laŭ miaj monebloj. Tamen mi klarigos al vi mian tutan celon, por ke vi, nepravaj kaj maljustaj kritikantoj, kaj la ceteraj samideanoj apartenantaj al H. E. A., kiuj simpatie kaj kontente akceptas ĉi tiun hodiaŭ humilan gazeton, formu opinion de hodiaŭ en la Kongreson, dum kiu ni pritraktos ĉi tiun aferon: estas mia celo, ke «Hispana Esperanto» atingu la saman famon, kiun atingis «Hispana Esperantisto», laŭ atestas leteroj de eminentaj esperantistoj, kaj grandan nombron da paĝoj, 40-64 paĝojn; ke H. E. A. havu la gazeton sen elspezoj pro preskosto. Kiamaniere fariĝos ĉi tiu miraklo? Tre facile per la favoro de la membroj de H. E. A., donante al ĉi tiu tri pesetojn po jare por subteni la gazeton, kaj kiam la nombro da subtenantoj pagu la preskoston por la 16 paĝoj, mi publikigos 24 paĝojn ĉiumonate, el kiuj almenaŭ 8 paĝoj estos dulingve; kiam la subtenantoj pagu la 24 paĝojn, mi publikigos 32 paĝojn, k. t. p. Do, dependas de la entuziasmo de la H. E. A.-anoj, de la fervoro al nia tutlanda Asocio, pri kiu la nomo estas duaĵo, ke la miraklo fariĝu. Aliĝu tuj al H. E. A. kaj se vi povus, sendu tri pliajn pesetojn por partopreni realigi la celon!

Mi petas al vi, karaj samideanoj, ke vi bonvolu komuniki al mi per simpla poŝtkarto viajn tute sincerajn opiniojn pri la gazeto ĝis nun, kaj pri la plano, kaj ankaŭ ĉu mi plenumis aŭ ne tion, kion mi promesis, mian kompromison; mi repetas al ĉiuj viajn opiniojn, kiuj estos al mi kvazaŭ gvidilo por kiel eble plej baldaŭ kontentegi vin ĝenerale, ĉar ĉi tio estas mia ĉefa celo por firmigi nian Asocion; sed ĉio dependas de vi mem, ĉar ju pli da membroj kaj subtenantoj vi varbu des pli bone por akceli la planon.

Julio Mangada Rosenörn



SEVILLA. — Alkazar. Reĝa araba palaco kun belegaj salonoj kaj kortoj Per tiu bildo oni vidas parton de la «Korto de la Pupoj».

KRONIKO

ENLANDA. *Madrido*.—La 17^{an} de majo, okazis en la Ateneo la disdonado de premioj al gelernantoj de diversaj lingvkursoj, kaj rimarkinda festo dum kiu ĉiu lingvo sin montris al la multenombrega ĉeestantaro, sed la plej grandan impreson kaŭzis la gelernantoj de Esperanto, ĉar spontaneo, sincereco, realeco, evidentiĝis, elpruvante kiel lernantoj de sola kurso interparoladas kaj konas firme kaj funde gramatikaĵojn; popolaj kantoj hispanaj kaj fremdaj esperante rimarkinde impresis la publikon, eĉ profesorojn de aliaj lingvoj konstatis sukceson kaj esprimis sian miron kaj gratulojn. La gelernantoj de l' ceteraj lingvoj miregis aŭskultante la fluan konversacion de la esperanto-lernantoj.

La 25^{an} de la sama monato, okaze de restado ĉi tie de la Direktoro de la Instituto «J. J. Rousseau» kaj de la Internacia Oficejo por Edukado, S-ro Petro Bovet, Hispana Esperanto-Asocio improvizis feston je la honoro de tiel eminenta samideano en la Ateneo. Multenombraj geinstruistoj kaj samideanoj ĉeestis. La Prezidanto de H. E. A., S-ro Vicente Alonso, sincere emocie salutis la honoriton kaj dediĉis al li la feston; F-ino Maria Franco, Prezidantino de la Centra Madrido Grupo, prezentis belan korbbon el floroj al S-ro Bovet por lia edzino, je la nomo de la Hispana Esperanto-Asocio kaj la hispanaj esperantistinoj, S-ro Julio Mangada paroladetis rimarkigante kiamaniere Registaroj, altrangaj politikistoj, diversaj kaj multenombraj internaciaj Ligoj, la lernejoj mem k. c., celas la starigon de la Paco vane; ke la lernejo estas la sola krisolo en kiu fandiĝos la militiloj, sed por la fando nepre necesa estas la potenca varmo de Esperanto per ĝia *interna ideo* enradikiĝanta en la koroj de la geinfanoj de ĉiuj popoloj interrilatigitaj dum la infaneco de nia helpa internacia lingvo, subtenante la interrilatigadon dum ilia adoleskeco kaj matureco, pro kio S-ro Bovet estis petata instigu la hispanajn geinstruistojn al tuja alprenado kaj enkonduko de Esperanto por la lernejoj; knabeto Rafael Duran legis kaj tradukis la poemon de S-ro Cart «Ho, Don Kihoto»; F-inoj Teresa kaj Natividad Monsell, kaj Lucrecia de San Antonio, recitadis esperantajn tradukojn, kaj ili kun Elena kaj Anselma Monsell, kiu ankaŭ akompanis plane, kantis hispanajn kaj fremdajn popolkantojn. Fine S-ro Bovet parolis esperante,

esprimante siajn grandajn ĝojigajn impresojn kaj korajn dankojn pro la tute interesa, simpatia, sentiga kaj fratiga festo, kiu estis sukcesplena malgraŭ la improvizo.

Kaŭze de la instigo de S-ro Mangada, instruisto kaj samideano, S-ro Sidonio Pintado, petis leteron pri Esperanto al S-ro Bovet por interesigi la hispanan geistruistaron, kaj ĝin aperigi, tiacele, sur «El Magisterio Español» (kiu ankaŭ aperas sur antaŭaj paĝoj de ĉi tiu gazeto).

Las Palmas.—Nia sperta samideano S-ro Fernando Redondo laboras por reorganizi la esperantan Grupon. Ĉe la haveno ankriĝis la hispana vaporŝipo «Esperanto».

Malaga.—S-ro Serafin Baudin, D-ro de la Lernejo «Bergamin», faras fruktodonan laboron: li tre ofte aperigas esperantajn artikolojn sur la Gazetaro, klarigis kurson ĉe la Asocio «Amigos del Pais», kaj klarigas Esperanton al siaj infanoj, celante gvidi karavanon el ili al nia nacia Kongreso de Sevilla kunportante belan silkan flagon. Li varbis por nia Kongreso gravajn Asociojn, k. t. p. Samideanoj imitu lin!

Oviedo.—La movado des pli kreskas, intensiĝas. En ĉi tiu urbo estas jam ses grupoj, kaj baldaŭ fondiĝos novaj en la regiono. La tuta Gazetaro favore parolas pri Esperanto.

Tocina (Sevilla).—Ĝus oni fondis la Grupon «Gajeco kaj Laboro», kiu konsistas el 26 membroj, kaj kies Komitato estas la jena: S-roj Isidoro Diaz Maqueda, Francisco Muñoz Martinez, kaj Jose Salsoso, Prez., Vicpre. kaj Skr. respektive, F-inoj Rosario Baile Torres kaj Erminia Gonzalez Rivera, Voĉdnantinoj; S-ro Antonio Carrasco Marquez, Voĉdonanto. La grupanoj komencis fari siajn laborataĵojn por atingi la Diplomon de nia Instituto.

EKSTERLANDA

Aŭstrio.—Ĝus oni fondis *Internacia'n Esperanto-Muzeo'n* en *Wien*, kies celo estas kolekti kaj konservi la materialon ligitan kun la movado de Esperanto kaj de la lingvaj sistemoj kaj dokumente pruvi la disvastiĝon de nia lingvo en la diversaj landoj. La situacio de *Wien*, ĉe la centro de Eŭropo, kaj la favoro de la Registaro, sub kies aŭspicioj, ĝin fondis, estas grandaj, rimarkindaj kaj atentindaj cirkonstancoj por sukcesigi la entreprenon.



SEVILLA.—Korto de tre bela domo kiu apartenes al grafa bienulo; tiu domo estas moderna konstruaĵo sed ĝi enhavas tre belajn salonoj de diversaj arkitekturaj stiloj.

La kanceliero de Aŭstrio, D-ro Ignaz Seipel, apartenas al la Internacia Honora Komitato kun aliaj ministroj kaj altranguloj.

Ĉio estas valora por la Muzeo, karaj samideanoj de la tuta mondo! Alsendu vianeron kiel eble plej baldaŭ, donacante aŭ pruntedonante ĝin, kaj via nomo aperos sur via alsenditaĵo. Aliĝu kiel membro pagante *unu* sv. fr., kaj vi ricevos membrokarton kaj ĝuos diversajn avantaĝojn. Adreso: Int. Esp.-Muzeo, str. Liebiggasse, 5.

Svedujo. En *Stockholm* okazis en la Koncerta Domo publika ekzameno de la lernantoj de pastro Andreo Ĉe, inter la 500 ĉeertantoj estis multaj pedagogoj kaj la ĉefdirektoro de la sveda ŝtata lernejararo S-ro. J-son Bergquist. La plej grava efiko estis, ke la Sveda Instruista Unuiĝo kaj la Sveda Instruistina Unuiĝo decidis aranĝi somerajn esperantajn kursojn por la tutlanda sveda geinstruistaro. La kursoj, al kiuj ankaŭ la danaj, norvegaj kaj finnaj gekolegoj estas invititaj, okazos de la 11.^a de junio ĝis la 7.^a de julio en *Stockholm*. Jen la alvoko de la 23 geinstruistoj kiuj partoprenis la kurson: «Svedujo nun gastigas la hungaran pastron Andreo Ĉe el Rumanujo. Multon oni skribis pri li en la gazetoj kaj ankoraŭ multo estas direbla. Kio nin, geinstruistojn, aparte interesas, estas la rapidkursoj en Esperanto, kiujn li gvidis dum ĉi tiu printempo. La plejmulto de ni, subskribintaj geinstruistoj en popollernejoj kaj gimnazioj de *Stockholm*, aliĝis al la kursoj pro nura scivolemo, sed ni ĉiuj devis daŭrigi kaŭze de la bonega kvalito de la kursoj. S-ro. Ĉe posedas apartan instrumentodon, sen lernolibroj, sen deviga hejmlaboro, per ĥora respondado al demandoj, kiu kuraĝigas kaj progresigas eĉ la plej modestan lernanton. La eminenta pedagogia povo de S-ro Ĉe faris el la lingvaj lecionoj horojn de amuzo kun vere ĝojiga kaj interesa konversacio. Ni ĉiuj ne povas uzi tro superlativajn esprimojn por nia admiro al S-ro Ĉe kaj lia instrumentodo. Tial ni rekomendas partoprenon en la kursoj aranĝotaj por la sveda geinstruistaro, kiel ion plej interesan, je kio oni povas sin okupi dum la somero.»

Rimarko de la Redakcio: ni kopiis la dokumenton, pro kio ni ne la finon korektis.

RECENZEJO

For la Neŭtralismo! de E Lanti, tria eldono de SAT, 12 × 19 cm., 32 paĝa. Bonstila, korekta, ĉar nur makuletojn mi rimarkis ekzemple, ĉe la fino de la 4.^a paĝo *oportuna*, mi opinias «ĝustatempa» aŭ «nun-

tempa»; ĉe la 12^a paĝo *similis la nian*, mi dirus «similigis nian». La teksto estas neĵusta, kaj la aŭtoro, per siaj diroj mem, kontraŭdiras siajn argumentojn. Dank'al neŭtraluloj SAT trovis facilan vojon por sia stariĝo kaj firma progresado; la neŭtraluloj ne estas atakindaj, sed male. Prezo: 0,30 Mkg. Adreso: Richard Lerchner, Colonstrasse, 1. Leipzig-0-27. Germanujo.

Novaj Bulgaraj Rakontoj de Ivan Varzov, tradukitaj de Georgi Atanasov, 12 × 16 1/2 cm., 62 paĝa. El la ok rakontoj la plej interesaj estas «Paŭls Fertigo» kaj «Avo Joco rigardas». La unua pritaktas scenojn kaj agadon de verŝajne malsaĝa aŭ frenezeta knabo, sed ĉiam paca, gaja, komplezema kaj ofte sprita, kiu saĝe helpas fraton per siaj ricevitaj almozoj por ke li en Svisujo finu medicinan studadon; la dua parolas pri maljuna kamparano blindiĝinta antaŭ la liberiĝo de Bulgarujo, kaj kiu *volas rigardi la bulgarojn kaŭze de la liberiĝo*, ĉar ĉi tiu estis lia konstanta revo, per policestro, soldato, bruo de laboriloj por konstrui fervojon kaj per tiu de vagonaroj jam ruladantaj sur la reloj, kiujn plengoje ĉiutage li salutadas de la supro de ŝtontranĉaĵo, kie li mortas salutante. Ĝenerale la stilo estas korekta; sed mi preferus pli «disvas-tiĝis» ol «disportiĝis»; pli «malagrable» ol «neoportuna», pli «kiel stranga vi estas» ol «Kia originalo vi estas»; pli «Tiujn ĉi nealireblajn tiutempe montajn dezertojn la eĥo de la milito malforte atingis» ol «Al tiuj ĉi nealireblaj tiutempe... Ankaŭ mi rimarkis eraron pri uzo de posesiva de tria persono, pri prepozicio, de akuzativo kun iĝ. Prezo 1 sv. fr. ĉe Centra Librejo Esperanto. Str. María Luisa, 38. Sofia. Bulgarujo.

Bahaaj pruvoj de vivo post morto de Martha L. Root, broŝuro 23 × 15 cm., 8 paĝa (Bahaa Esperanto-Eldonejo. *Wandsbek*. Germanujo). La ok paĝoj, per korekta flua esperanto, laŭ bona stilo, celas elpruvi la titolon de la verketo, kiu estas interesa, kaj pri kies enhavo de alia vidpunkto konscia kaj konscienca ni ne opinias. Prezo ne montrita.

Pri la Origino de l'Homo de p-ro. Sir Arthur Keith, tradukita de p-ro. WM. Brown kaj F. R. A. McCormick, 18 × 12 cm., 64 paĝa. Prezo: broŝurita, 1 ŝ. 11 p.; bindita, 2 ŝ. 9 p. Mendu; pogrande al The Esperanto Publishing Co., Ltd., 142, High Holborn, London, W. C. 1; podetale al The British Esperanto Association, sama adreso, kaj al ĉiu Esper.-Librovendisto. *Angla-Esperanto Vortareto*, 2 pencoj, petu al

B. E. A. La libro estas plena je interezo, kaj nur makuletojn mi trovis: vortojn *frekventa*, *primata*, *eksplozivegaĵo*, *domestika*, k. c., kiuj ne estas necesaj ĉar ni havas *ofta*, *primaria* aŭ *primitiva*, *eksplozaĵo*, *doma*, k. c.; *ampleksi* anstataŭ *ampleksigi*, *movi* anstataŭ *moviĝi*, *geologo* anstataŭ *geologiisto*, *armaro* anstataŭ *armilaro*. Vortojn: *ĵangalo*, *implemento*, *bebo*, k. c., kiuj ne estas sur vortaroj. *Ke* anstataŭ *kie*; *al* anstataŭ *de*. «... en kiu la episkopo de Oxford, laŭ ni «... *estis venkata de Huxley*»; «mi aludis al la esploradoj...», laŭ ni «mi aludis la esploradojn...», kaj iujn strangajn parolturnojn.

«Gvidfolio pri Nordeney», malgranda, 16 paĝa, bone presita, kun kelkaj belaj bildoj, informas detale pri la Banloko fondita je 1797.

SENDU KIEL EBLE LEJ BALDAŬ VIAN KOTIZON POR HISPANA ESPERANTO ASOCIO. SE VI SENDUS SAMTEMPE TRI PLIAJN PESETOJN VI RICEVUS ĈI TIUN GAZETON. KAJ KIEL DONACON, LA UNUAN APERINTAN KAJERON DE «DON KIHOTO» KAJ APERONTAJN DUM LA JARO DE TIU TUTMONDFAMA VERKO, KAJ LA HISTORIAN NOVELON EN PROZO KAJ VERSO «FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI». RAPIDU SENDI LA KOTIZOJN PETANTE LA LIBROJN, ĈAR LA RAJTO POR LA DONACO FINIĜOS. FREMDULOJ RAJTOS SAME, KIEL ENLANDANOJ, SENDANTE KVIN SVISAJN FRANKOJN PER POŝTĜIRO.

ENLANDANOJ sin turnu al S-ro MARIANO MOJADO, strato ABASCAL, 13, MADRID.

FREMDULOJ al S-ro JULIO MANGADA ROSENORN, Glorietta de Bilbao, 5, MADRID (Ĉi tiu akceptas dolaran bankvileton aŭ francajn bankbiletojn).

«DON KIHOTO» nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Santa Teresa, 16-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kian mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mendo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj, la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40%. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^{io}
Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO